ESPERANTO
INTERNACIA LINGVO

# ELNA-BULTENO

## ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 9(71) JULIO 1971

LA UNIVERSALA KONGRESO, OKAZONTE PORTLANDON, 1972, BEZONAS VIN

Alilandanoj kiuj anticipe antaŭ-rigardos la alvenon al Usono (por multaj estos la unua vizito), okaze de la Universala Kongreso, **bezonas** vian helpon, se la sperto estus ĝuinde. La loka komitato deziras faciligi la registron de alvenantoj, la tuj elekto de loĝ- kaj dorm-lokoj, ktp. Se vi servus en giĉeto aŭ budo, la komitato promesas, ke tia agado ne detruos vian ĝuadon de la kongresaferoj, sed kontraŭe pligrandigos la plezuron. Pluraj novlernantoj strebas bonposedon de la lingvo, por ke ili povas helpi, sed oni atendas ankaŭ vin. Bonvolu sendi vian nomon kaj adreson, kiel helpanton, al: H. Ken Ver Ploeg, E.321-19th Ave., Spokane, Washington 99203.

SUBTENU LA JUNULARON

Zamenhof estis junulo kiam li kreis Esperanton. Hodler estis junulo kiam li fondis UEA. Fariĝu Patrona Membro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando.

(ISAE) INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA PLIFORTIĜAS EN USONO

La usona peranto de ISAE estas S-ro Ken Thomson, kiu raportis, ke la membrokotizo estas $3.75 jare, aŭ $2.25 por studentoj. Ĉiuj membroj ricevos "Sciencan Revuon" kaj la "Bultenon" de ISAE. Enketante oni turnu sin al: Internacia Scienca Asocio Esperantista, P.O. Box 663, Houston, Texas 77001.

SUKCESIS LA TUTŜTATA KONGRESO EN OHIO

La 27an de junio, ĉe la "Hospitality House" en Cincinnati, Ohio, okazis tutŝtata Esperanto-kongreso. Oni ĝuis Esperantan filmon, diskutadon pri lastatempaj Esperanto-agadoj en Ohio, kaj oni ankaŭ planis por la venonta jaro multajn interesplenajn aferojn.

LERNANTOJ EN PORTLANDO SIN PREPARAS POR 1972

Dum junio komencis saĝuloj Esperantan Kurson en Portland, Oregon, en la nova Biblioteko Holgate. Hazel Heusser estas la instruistino.

S-RO CLARKSON CRANE MORTIS

Estis surprizo al la amikaro de ĉi tiu modesta viro (1894-1971), ke li estis mondfama ricevanto de honoroj. Oni raportis, ke li neniam diris ion ajn pri siaj verkoj (kiuj inkluzivis tri Romanojn: The Western Shore, 1925, Mother and Son, 1946, Naomi Martin, 1947), nek pri sia "Croix de Guerre" de la unua mondmilito, nek pri la jaroj en Eŭropo aŭ kiam li estis prelegisto de la Universitato Kalifornio, ktp. La plej granda intereso, pri kiu li kutime parolis, estas la bela ideo de la internacia lingvo, kiun li amis paroli, eĉ dum la finaj tagoj en la malsanulejo. Unu forta deziro - vivi ĝis la eldonado de la PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, SAT, 1970) - feliĉe kaj riĉe plenumiĝis. Finmatenon, li rigardis la ĉambron kaj diris, "La vivo ĉi tie estas same kiel tiu en la romanoj de Kafka." Baldaŭ poste li trankvile mortis.

# ELNA-BULTENO

**KUNFONDINTOJ** Donald Munro + Rodney Ring

**ADRESO** ELNA-Bulteno
Muhlenberg College
Allentown, Pa. 18104

## NI KORESPONDU

Nova Esperantisto, Kiu nun loĝas en Orienta Pakistano, deziras korespondi kun ELNA-anoj en Usono. Li petas la uzon de la adreso de sia familio en Anglio. S-ro Keith E. Wilson, 3 Cherry Lane, Sandiway, Northwich, Cheshire, Anglio (England).

40-jara dentisto, kiu ĵus lernis la lingvon, volas ricevi leterojn el Usono en Esperanto. D-ro Konrad Antoniewski, Watbrzych 11, Okolna 72, Polando.

Muzik-entuziasmulo deziras interŝanĝi interesaĵojn kun plum-amikoj en Usono, ĉefe 33 1/3 diskojn kun modernaj jazz-kantoj. Li sendos al vi diskojn de rusaj popolkantoj, dancoj, ktp. Danielo Kolker, Zaporoĵje 33058, S-Kolcevaja 20- 149, Sovietunio (Soviet Union).

65-jara laboristo, kiu Esperantiĝis antaŭ 35 jaroj, volas korespondi kun laboristoj usonaj pri vivmanieroj. S-ro Antoine Cnudde, 17114 Rue Henri Reynault, 59 Roubaix, Francujo (France).

Dana kampad-entuziasmulo, kiu tre interesiĝas en "libertempa centro" apud Kopenhagen, kie oni uzas Esperanton ("Esperanto-kampadejo": malfermata dum la tuta jaro) deziras korespondi pri tio, kaj ankaŭ pri diversaj temoj. S-ro Regner Knudsen, Fjordgaardsvej 5, DK-4300, Holbak, Danlando (Denmark).

31-jara rumana pentristino, filmaktorino, kaj ĵurnalistino serĉas usonajn gekorespondantojn, kiuj vere respondos al siaj demandoj, kaj, kiuj ankaŭ interesiĝas en literaturo, poezio, ĵurnalismaj aferoj, pentrarto, lingvistiko, filosofio, filmarto, kaj muziko. Ŝi interŝanĝos bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun geamikoj. D-rino Florentyna Renatte Lorelay Dudescu, Poŝtrestanta, urbo: Covasna, jud.: Covasna, Rumanio (Rumania).

## OFICIALAĴO

El la aferoj de la Kongreso, kiujn mi resumis en la paĝoj sekvantaj por la legantoj de ELNA-Bulteno, pro kio ni ne povas ĉifoje uzi la kutimajn rubrikojn, estas malmultaj de ĝenerala intereso, kiujn vi povas legi ĉi tie:

La Kongresa Protikolistino estis Bonnie Helmuth, kiu faris ĝustan 6-paĝan priskribon de la aferoj de la kvar tagoj.

Dimanĉe, la 4an de julio, la prezidanto anoncis, ke $100.00 estis anonime donacitaj por la Universala Kongreso en Portlando en 1972.

S-ro Francis Helmuth petis sabate, la 3an de julio, kvin volontulojn por la ~~Kandidatiga Komitato, por la venonta jaro. Feliĉe Allen Fineberg, D-ro H. I.~~ Weiner, kaj S-ino Peterson sinproponis. La prezidanto nomigos du aliajn post la kongreso; li memorigis la grupon, ke ili estos devigataj trovi novan prezidanton. La Esperantistaro vere ŝuldas dankecon al ĉi tiu agema familio (R.R.)

ELĈERPAĴOJ DE LA PROTOKOLO DE LA 19a ELNA-KONGRESO EN SAN ANTONIO, TEXAS

D-ro David Keedy, vic-prezidanto de la Esperanto-Klubo Von Nimitz malfermis la kongreson, ĵaŭde, la 1an de julio, 1971, je la 9:45 atm. en la Hotelo Gunter en San Antonio. Li legis salutleterojn senditajn de Ivo Lapenna kaj de la Kanada Esperanto-Asocio.

La prezidanto de ELNA, Francis Helmuth, bonvenigis ĉiujn al la kongreso kaj petis, ke ĉiu kongresano trastudu la 17-paĝan multobligitan raportaron disdonita al ĉiuj.

Sekvis la saluto de unu eksterlanda vizitanto, Emilio Arias el Meksikio.

Salutis la kongreson ankaŭ la sekvantaj lokaj kaj regionaj reprezentantoj: por SFERO Bob bailey, por Florida S-ino Giguere, por San Diego Louis Stein, por Los Angeles J. Fulton, por Santa Barbara R. Holland, por Chicago Kent Jones, por Sacramento G. Carlton, por Portland D. Jones, por New Mexico Roan Stone, por Ohio E. Hammock, por New York M. Starr, por Washington D-ro Weiner, por Houston K. Thomson, por New Jersey A. Fineberg, por Pharr (Tex.) A. Doneis, por Hadley Lernejo por Blinduloj en Winnetka (Ill.) D-ro Egiguren.

La prezidanto nomis la jenajn kongres-komitatojn:

BALOTA KOMITATO
Armin Doneis, Cecelia Peterson, Roy Holland

FINANCA KOMITATO
Bob Bailey, John Fulton, Kent Jones

RAPORTA KOMITATO
Peg Barkley, Lou Stein, Allen Fineberg, D-ro H.I. Weiner

REZOLUCIA KAJ PROPONA KOMITATO
Mark Starr, Ken Thomson, Dorothy Holland, Roan Stone

Ankaŭ salutis la kongreson la jenaj reprezentantoj de fakaj organizoj: por JEN Stefano Teeples, por AAIE Dorothy Holland, por la Inform-Centro Novjorka Mark Starr, por la venonta kongreso en San Francisco Peg Barkley, kaj por la libro-servo de la Inform-Centro Okcidenta Bob Bailey.

Post anoncoj kaj raportetoj la kunveno fermis por la tago, kaj la prezidanto malfermis la duan kunsidon vendrede, la 2an de julio. Tiam sekvis raportoj:

RAPORTO de la arkivisto, D-ro Balcar, unuanime akceptita.
RAPORTO de la prezidanto, Francis Helmuth, akceptita kun unu malaprobo.
RAPORTO de la prez. de la LKK, Portland, Jim Deer, unuanime akceptita.
RAPORTO de Conrad Fisher, Sekretario, akceptita kun unu malaprobo.
RAPORTO de la oficiala POSTKONGRESO, San Francisco, unuanime akceptita.
RAPORTO de Bonnie Helmuth pri eksterlandaj gazetoj unuanime akceptita.
RAPORTO de W. Schulze pri la Inform-Centro Okcidenta akceptita kun unu malaprobo.
RAPORTO de la kasistino, P. Linker, akceptita kun unu malaprobo.
RAPORTO statistika de Armin Doneis akceptita kun unu malaprobo.
RAPORTO de A. Doneis pri la Komitato Pri Membreco kaj Organizo akc. kun aplaŭdo.
RAPORTO de la UEA-Ĉefdelegito, A. Doneis, akceptita kun unu malaprobo.
RAPORTO de Mark Starr, Inform-Centro Novjorka, unuanime akceptita.
RAPORTO de Helen Starr pri ELNA NEWSLETTER unuanime akceptita kun laŭdo.
RAPORTO de D-ro Ring pri ELNA-Bulteno akceptita unuanime.
RAPORTO de Ges-roj Holland pri la Ekzamena Servo akceptita kun unu malaprobo.
RAPORTO de Adrian Hughes pri Propaganfolioj kun unu malaprobo akceptita.
RAPORTO pri Represo de CED-Dokumentoj, de Gary Mickle, akceptita unuanime.
RAPORTO de la Komitato pri la Semajno de Internacia Amikeco, de Ken Thomson, akceptita kun unu malaprobo.

DUMJAROJ KOMITATOJ: BIBLIOTEKA KAMPANJO, Stefano Teeples; PAĜINDIKILA KOMITATO, Martha Walker kaj Bob Bailey; ATESTILO-KOMITATO, Roy Holland; KOMITATO DE LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO, K. Thomson, Thelma Liphard, Ralph Wagner, Roan Stone, Francis Helmuth, Nancy Wolter, Frances Lesher; KOMITATO DE MIGRANTA EKSPOZICIO, Martha Evans; MEMBRECA KOMITATO, Kent Jones; KOMITATO PRI CED-DOKUMENTOJ, Gary Mickle; INFORMIL-KOMITATO, Erik Felker.

PROPONOJ legitaj de Ken Thomson, estro de la komitato, komence la 3an de julio

Propono 1 ke ELNA subvenciu EIC/NYC je la sumo de $1,000 por la jaro '71-'72
Unuanime akceptita, post longa diskuto

Propono 2 ke ELNA subvenciu EIC/WC je la sumo de $720 por la jaro '71-'72
Unuanime akceptita sen diskuto

Propono 3 ke ELNA aperigu membroliston de la ligo ĉiujare
Aprobita kun unu malaprobo

Propono 4 ke ELNA presigu dankatestilojn taŭgajn por personoj aŭ organizoj ne-esperantistaj, kiuj helpas la movadon aŭ nacie aŭ internacie; ekzemplero estu sendata al ĉiu, kiu faris elstaran servon al Esp'o
Aprobita kun du malaproboj

Propono 4A por esprimi nian estimon kaj dankon al Glenn Turner
Unuanime akceptita

Propono 5 ke ELNA daŭrigu subvencion al TEJO dum la fiska jaro '71-'72 je la sumo de $300 pagota en unu sumo
Aprobita kun unu malaprobo

Propono 6 ke ELNA provizu sumon de $300 al AAIE, kiu administros programon de premioj por studentoj de fremdaj lingvoj en kolegioj kaj universitatoj, kiuj kompetentiĝos kiel instruistoj de Esperanto
Aprobita kun tri malaproboj

Propono 7 ke ELNA instigu ĉiujn membrojn kontakti amikojn kaj klubojn, kiuj posedas aparatojn amator-radiajn kaj por faciligi interkontaktojn de nia kontinentvasta membraro kaj por fortike enkonduki Esperanton en la amatorradian fratularon pere de iliaj aparatoj kaj ke ELNA-anoj mem esploru la eblecon mem fariĝi radio-amatoroj
Aprobita kun unu malaprobo

Propono 8 rigardante la strebojn de Usono kaj Sovietio starigi savsistemon por spacveturantoj, kaj agnoskante la lingvajn malfacilecojn, ke ELNA sugestu al la Nacia Astronaŭtika kaj Spac-Administracio la uzadon de Esperanto inter astronaŭtoj kaj kosmonaŭtoj
Aprobita kun unu malaprobo

Propono 9 ke ELNA donacu $50 al CED kiel financa subteno dum la venonta jaro
Akceptita kun unu malaprobo

REZOLUCIOJ ankaŭ metitaj antaŭ la kongreso komence la 3an de julio

Rezolucio 1 ke ELNA gratuli S-ron Smith pro la enkonduko de Esperanto en indiana altlernejo ĉe Ft. Wingate, N.M. Tiu estas la unua fojo, ke indianoj havos la okazon lerni la Internacian Lingvon
Unuanime akceptita

Rezolucio 2 ke ELNA instigu kunlaboron de UEA kaj SERVAS por gastigi Esperantistojn vojaĝantajn tra la mondo, reciproke informante la delegitojn kaj la SERVAS-partoprenantojn en ĉiu lando, kaj krome starigi fakon pri tiu afero
Aprobita kun du malaproboj

Rezolucio 3 ke ELNA subtenu la ideon de Monda Himno en la Internacia Lingvo, kaj instigu Kent Jones prizorgi la aferon, proponita de la Bowes-Kompanio
Unuanime akceptita

Rezolucio 4 ke tiu ĉi 19a ELNA-Kongreso urĝu anojn duobligi iliajn penojn por la agnosko kaj uzado de la Internacia Lingvo speciale rilate al la 57a UK ĉe Portlando, 1972, kies sukceso tie antaŭenpuŝos nian movadon en Usono
Unuanime akceptita

Rezolucio 5 ke nia 19a Kongreso de ELNA serioze rekomendu al la ĝustaj aŭtoritatoj ĉiulandaj, al la koncernitaj korporacioj kaj al la Radio-Televida Fako de UNO kaj al proponitaj sistemoj tutmonde la praktikan uzadon de Esperanto; kaj plue rekomendu, ke tia teknika aparato estu je la dispono de UNO por helpi eduki kaj informi la homaron de nia planedo
Surtabligita, sed unuanime akceptita la 4an de julio

Rezolucio 6 ke ELNA sincere danku kaj laŭdu la LKK en San Antonio pro la kompetentega laboro kaj afableco dum la 19a ELNA-Kongreso

KASISTA RAPORTO por la fiska jaro ekde la 1an de julio '70 ĝis julio '71

ENSPEZO

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1970 kotizoj ricevitaj dum julio 1970 | | | | $216.00 |
| 1971 kotizoj ricevitaj ĝis junio 1971 | | | | |
| Jen Bulteno nur | ($2) | 7 | 14.00 | |
| JEN | ($3) | 41 | 123.00 | |
| JEN patrona | ($5) | 1 | 5.00 | |
| duonjara MA | ($4) | 1 | 4.00 | |
| MA | ($8) | 259 | 2072.00 | |
| MA-Jen Bult | ($9.50) | 94 | 893.00 | |
| G | ($12.00) | 24 | 288.00 | |
| G-Jen Bult | ($13.50) | 19 | 258.50 | |
| S | ($15) | 6 | 90.00 | |
| S-Jen Bult | ($16.50) | 10 | 165.00 | |
| PA | ($25) | 4 | 100.00 | |
| PA Jen Bult | ($26.50) | 1 | 26.50 | |
| Pioniro | ($4) | 18 | 72.00 | |
| PI-Jen Bult | ($5.50) | 4 | 22.00 | |
| Viva | ($160) | 2 | 320.00 | |
| bil je viva | | | 110.00 | |
| | | | | 4563.00 |
| Procento de Viva "Trust" fonduso | | | | 146.50 |
| 1972 kotizoj jam ricevitaj | | 3-MA | | 24.00 |
| | | 1-PA | | 25.00 |
| 1973 kotizoj jam ricevitaj | | 1-MA | | 8.00 |
| Vendado | | | | 347.62 |
| Donacoj | | | | 315.44 |
| Interezo | (3 kvaronoj) | | | 164.95 |
| | | | | $5810.51 |

ELSPEZO

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| EIC/WC | 600.00 | | | |
| EIC/NYC (inkl.NEWSLETTER) | 420.12 | | | |
| ELNA BULTENO | 324.39 | | | |
| Oficistaj elspezoj | 503.56 | | | |
| Membreca Komitata elspezo | 258.26 | | | |
| JEN elspezo | 172.03 | | | |
| Eldonaĵoj | 271.67 | | | |
| Internacia Kunlab. Kom. | 25.00 | | | |
| Esperanto-Domo | 200.00 | | | |
| ESPO reklamo | 34.00 | Enhavo de | | |
| Korporacio-pago | 10.00 | julio, '70 | 7483.41 | |
| CED | 50.00 | | 5810.51 | enspezoj |
| Arkiva elspezo | 205.58 | | 13293.92 | |
| | $3074.61 | | 3074.61 | elspezoj |
| | | | $10219.31 | saldo |

Distribuo:

| | |
|---|---|
| ĉeka konto | 5887.96 |
| ŝpara konto | 788.36 |
| ŝpara "certificates" | 3552.99 |
| | $10219.31 |

---

Junulara Fonduso

| | |
|---|---|
| 1291.67 | malnova bilanco |
| 150.00 | al TEJO |
| $1142.67 | nova bilanco |

Universala Kongresa Fonduso

| | |
|---|---|
| 1264.67 | malnova bilanco |
| 189.00 | ricevitaj |
| $1453.67 | nova bilanco |

Fonduso de Elizabeth Rankin - $75.00 ne-ŝanĝata

de Peggy Linker, Kasistino

# O F I C I A L A  E L N A - A D R E S A R O

PREZIDANTO
Francis E. Helmuth
5526 Beaumont Ave.
La Jolla, Cal.
92037

VICPREZIDANTO
Mark Starr
3940-47th St.
Long Island City
New York, 11104

SEKRETARIO
Robert E. Bailey
147 Birch Street
Redwood City, Ca.
94026

KASISTINO
Peggy Linker
1414 Monroe St.
Walla Walla, Wash.
99362

KORESPOND-DIREKTORINO
Ellen A. Lewis
15 Salisbury Rd.
Brookline, Mass.
02146

UEA-ĈEFDELEGITO
Armin Doneis
P.O. Box 105
Pharr, Texas
78577

INFORMCENTRO OKCIDENTA
410 Darrell Road
Hillsborough, Cal.
94010

ARKIVISTO
D-ro B. J. Balcar
62 Via Castanada
Monterey, Ca.
93940

INFORMCENTRO NOVJORKA
156-5th Ave. Rm. 821
New York, N. Y.
10010

## RAPORTO DE LA BALOTA KOMITATO

La Balota Komitato ne elektis estron, do legis la raporton Roy Holland. El 146 balotiloj 8 estis nevalidaj; do restis nur 136 validaj balotiloj.

| | | |
|---|---|---|
| Elektitaj al la estraro estas: | Bill Harmon | 85 |
| | Allen Boschen | 79 |
| | Ken Thomson | 71 |
| Ne-elektitaj estas: | Louis Cook | 49 |
| | Al Estling | 70 |
| | Conrad Fisher | 53 |
| Nova ELNA-Sekretario estas: | Bob Bailey | 125 |

---

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA
156 FIFTH AVENUE, NEW YORK, N.Y. 10010

RETURN POSTAGE GUARANTEED
ADDRESS CORRECTION REQUESTED

NON-PROFIT ORG.
U. S. POSTAGE
Paid
Kutztown, Pa.
Permit No. 8